

L.N. Tolstoj

# LUCERNO

## El la notoj de la princo N. Neĥljudov

Mi alvenis Lucernon hieraŭ vespere kaj ekloĝis en la plej bona hotelo de la urbo, la Ŝvejcerhofo.

„Lucerno, malnova kantona urbo borde de la Lago de kvar kantonj,“<sup>1</sup> diras Murray,<sup>2</sup> „estas unu el la plej romantikaj lokoj en Svislando; tri ĉefaj vojoj kruciĝas en ĝi; kaj nur unu horon for per vaporŝipo troviĝas monto Rigi,<sup>3</sup> de kiu malfermiĝas unu el la plej grandiozaj panoramoj en la mondo.“

Ĉu prave aŭ ne, aliaj gvidlibroj diras la samon, kaj tial en Lucerno abundas vojaĝantoj de ĉiuj nacioj, precipe angloj.

### Unua sceno: Natura deliro<sup>4</sup>

La grandioza kvinetaĝa domo de la Ŝvejcerhofo<sup>5</sup> ĵus estis konstruita ĝuste apud la laga promenejo, la loko, kie en malnovaj tempoj staris ligna, kovrita, kurbiĝema ponto kun kapeloj en la anguloj kaj bildoj sub la traboj.<sup>6</sup> Nun, dank’ al la grandega invado de la angloj, iliaj bezonoj, gusto kaj mono, la malnova ponto estis malkonstruita kaj anstataŭigita per rekta digo. Oni konstruis kvarangulajn kvinetaĝajn domojn kaj antaŭ la domoj plantis tiliojn laŭ du vicoj, kiujn oni apogis per pilieroj, kaj inter la tilioj oni aldonis, kiel kutime, verdajn benkojn. Tio estas la loko, kie promenas tien kaj reen anglinoj kun svisaj ĉapeloj el pajlo kaj angloj en siaj praktikaj kaj komfortaj vestoj, kaj ĉiuj ĝojas, ke ili ekzistas. Povas esti, ke ĉi tiuj digoj, promenejoj kaj domoj, tilioj kaj angloj aspektus tre bone en iu ajn alia loko, sed ne ĉi tie, meze de tiu kurioze majesta kaj samtempe nepriskribeble harmonia kaj mola pejzaĝo.

Kiam mi supreniris en mian ĉambron kaj malfermis la fenestron al la lago, la beleco de ĉi tiu akvo, ĉi tiuj montoj kaj ĉi tiu ĉielo laŭvorte blindigis kaj skuis min en la unua momento. Mi sentis internan maltrankvilon kaj la bezonon iel esprimi la abundon de tio, kio subite plenis mian animon. En ĉi tiu momento mi volis brakumi iun ajn, forte ĉirkaŭpremi lian kolon, tikli, pinĉi lin, ĝenerale fari ion eksterordinaran kun li aŭ kun mi mem.

Estis la sepa vespere. La tutan tagon pluvis, sed nun la vetero sereniĝis. Antaŭ mia fenestro formoviĝis la lago, blua kiel brulanta sulfuro, kun sennombraj boatoj, kiuj aspektis kiel punktoj, kaj ties malaperantaj spuroj, senmove kaj glate, kvazaŭ ĝi estus konvekse ster-

---

<sup>1</sup> Lago ĉe la urbo Lucerno en centra Svislando, ĉirkaŭanta la svisajn kantonojn Lucerno, Unterwalden, Schwyz kaj Uri (vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Kvarkantona\\_Lago](https://eo.wikipedia.org/wiki/Kvarkantona_Lago)).

<sup>2</sup> Vojaĝgvidlibro pri Svislando nomata laŭ la angla libro-eldonisto John Murray (1808-92), aperinta en 1838 (Murray’s handbook for travellers in Switzerland).

<sup>3</sup> Preskaŭ 1800 metrojn alta impona monto bone videbla de la urbo Lucerno (vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Rigi>).

<sup>4</sup> La subtitoloj estis aldonitaj de la tradukinto.

<sup>5</sup> Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Hotel\\_Schweizerhof\\_Luzern](https://de.wikipedia.org/wiki/Hotel_Schweizerhof_Luzern).

<sup>6</sup> Germanlingve Kapellbrücke (vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Kapellbrücke>).

nita sur la diversaj verdaj bordoj kaj enpuŝita inter du grandegaj montkornicoj, kaj perdante lumon apogis sin kontraŭ la tur-alteĝaj, unu super la aliaj sin leviĝantaj montoj, nuboj kaj glaĉeroj, kaj malaperis inter ili. En la antaŭo kuŝis humidaj, helverdaj, kurbaj bordoj kun fragmito, herbejoj, ĝardenoj kaj vilaoj; krome aldoniĝis malhelverdaj, arbarkovritaj montetoj kun ruinoj de kasteloj; la fonon formis kunpuŝita, blanka montarĉeno purpurkolora kun bizaraj rokecaj kaj palblankaj neĝkovritaj pintoj; kaj ĉio estis superverŝita de milda, travidebla lazurblua aero kaj lumigita de la varmaj radioj de la sunsubiro, kiuj eksplodis tra la disŝirita ĉielo. Nek sur la lago, nek en la montoj, nek en la ĉielo ekzistis unu sola nerompita linio, unu sola nemiksita koloro, unu sola trankvila punkto: ĉie estis moviĝo, nesimetrio, fantazio, senĉesa miksaĵo kaj varieco de ombroj kaj linioj, samtempe trankvilo, moleco kaj la bezono de la unueco. Kaj meze de ĉi tiu nedifinita, konfuzita kaj libera beleco kuŝis tuj antaŭ mia fenestro la stulta, artefarita blanka kajo kun la apogitaj tilioj kaj la verdaj benkoj. Ĉiuj ĉi mizeraj kaj vulgarecaj verkoj, faritaj per homaj manoj, tute ne harmoniis kun la malproksimaj vilaoj kaj ruinoj en la ĝenerala beleco, sed, male, kontraŭdiris ĝin laŭ la plej kruda maniero. Vole nevole mia rigardo koliziis kun tiu terura rekta linio de la digo; mense mi volis repuŝi kaj detrui ĝin kiel nigran makulon, kiu sidas sur la nazo sub la okulo. Sed la kajo kun la promenantaj angloj restis en sia loko, kaj mi aŭtomate klopodis serĉi punkton, de kiu mi ne devis vidi ĝin. Mi sukcesis ĝustigi miajn okulojn tiel, ke ĝis la manĝo mi povis ĝui tiun nekompletan, sed des pli dolĉan senton de laceco, kiun oni havas, kiam oni tute sole dediĉas sin al la admirado de la naturo.

## Dua sceno: La angloj en la hotela manĝosalono

Je la sepa kaj duono oni vokis min por vespermanĝi. En la granda, grandioze meblita teretaĝo estis du longaj tabloj kovritaj por almenaŭ cent homoj. Ĉirkaŭ tri minutoj daŭris la silenta aperado de la gastoj, la susurado de la virinaj roboj, infanaj paŝoj, kvietaj interparoloj kun la ege ĝentilaj kaj graciaj kelneroj. Antaŭ la manĝilaroj eksidis viroj kaj damoj, kiuj estis tre bele, eĉ riĉe kaj tute nekutime pure vestitaj. Kiel ĝenerale en Svislando, la plej multaj gastoj estas angloj; tial la ĝeneralaj trajtoj de la komuna tablorondo estas la strikta respektado de la agnoskitaj reguloj de la deca konduto – la malkomunikiĝemo ne baziĝas sur la fiero de la homoj, sed sur la foresto de la bezono de la reciproka alproksimiĝo kaj de la plezuro, ke ĉiu mem trovu la konvenan kaj plaĉan kontentiĝon de siaj deziroj. De ĉiuj flankoj brilis blankegaj punktoj kaj kolumoj, blankegaj veraj kaj falsaj dentoj kaj blankegaj vizaĝoj kaj manoj. Sed la vizaĝoj, inter kiuj multaj estis okulfrape belaj, esprimis nur la konscion pri la propra bonfarto kaj la kompletan mankon de atento al ĉio ĉirkaŭa, kio ne rekte rilatas ilin mem. La blankegaj manoj kun la valoregaj ringoj kaj senfingraj gantoj de la virinoj moviĝis nur por rektigi la kolumon, tranĉi la viandon kaj verŝi la vinon en la glasojn; nenia emocia ekscito esprimiĝis en iliaj movoj. De tempo al tempo la familianoj interŝanĝis mallaŭtajn vortojn pri la bona gusto de tia aŭ alia manĝaĵo aŭ vino kaj pri la bela rigardo al la monto Rigi. La solecaj gevojaĝantoj sidis silente unu apud la alia, sen rigardi unu la alian. Se du el ĉi tiuj cent homoj parolis kune, tiam la konversacio verŝajne temis aŭ pri la vetero aŭ la grimrado sur la monton Rigi. La tranĉilo kaj forko apenaŭ moviĝis aŭdeble sur la teleroj, oni prenis nur tre modestajn porciojn kaj manĝis pizojn kaj alian legomon nepre per la forko; la kelneroj, kiuj vole nevole submetiĝis al la ĝenerala silentado, demandis en flustra tono, kiun vinon la gesinjoroj ŝatus havi.

Mi ĉiam sentas min peze dum tiaj manĝoj, malagrabla kaj fine malĝoje. Al mi ŝajnas, kvazaŭ mi estus kulpa pri io kaj devus esti punita kiel en mia infanaĝo, kiam oni sidigis min sur iun seĝon pro ia petolaĵo kaj ironie diris: „Do nun ripozu, mia kara!“ dum en miaj vejnoj pulsas juna sango kaj en la apuda ĉambro aŭdiĝis la gajaj krioj de miaj fratoj. Pli frue mi kutimis ribeli kontraŭ tiu sento de la subpremado, kiun mi travivis dum tiaj manĝoj, sed vane: ĉiuj ĉi senvivaj vizaĝoj havas nerezisteblan influon al mi, tiel ke mi mem fariĝas same senviva. La

solaj respondoj, kiujn mi ricevis, estis la samaj frazoj evidente ripetataj la centmilan fojon en la sama loko kaj far la sama vizaĝo. Sed certe ili ne estis stultaj aŭ sensentaj; multaj el tiuj frostaj homoj probable havas la saman internan funkciadon kiel mi, iuj eĉ multe pli interesan kaj komplikan. Kial do ili rezignas pri unu el la plej grandaj plezuroj en la vivo, nome la plezuro de unu pri la alia, la plezuro pri la homo?

Kiel malsame estis en nia pariza pensio, kie ni estis ĉirkaŭ dudek homoj el diversaj nacioj, profesioj kaj karakteroj kaj kie ni kolektiĝis sub la influo de la franca societemo ĉe la komuna tablorondo por trovi la plezuron! Ĉiu konversacio komencita ĉe iu ajn fino de la tablo kaj spicita per ŝercoj kaj vortludoj fariĝis tie, eĉ se kondukita en fuŝa lingvaĵo, tuj ĝenerala temo. Ĉiuj babilis sen zorgi pri kio ĵus venis en sian kapon; tie ni havis nian filozofon, nian debatanton, nian 'bel esprit'-on, nian kravatulon, ĉio estis al ni komuna. Tuj post la vesper-manĝo ni forpuŝis la tablon kaj dancis polkon laŭ ritmo aŭ ne sur la polva tapiŝo ĝis la nokto. Kvankam ni estis iomete koketaj, ne tre inteligentaj kaj dignaj homoj, ni estis homoj. La hispana grafino kun siaj romantikaj aventuroj, la itala abato, kiu deklamis el la *Dia Komedio*<sup>7</sup> post la manĝo, la usona doktoro, kiu havis aliron al la Tuilerioj,<sup>8</sup> la juna dramaturgo kun longaj haroj, la pianistino, kiu komponis, laŭ propra aserto, la plej belan polkon de la mondo, kaj la malfeliĉa bela vidvino, kiu portis tri ringojn sur ĉiu fingro – ni ĉiuj estis homoj, kiuj iom supraĵe, sed kun simpatio rilatis unu al la alia kaj forportis unu de la alia jen leĝerajn, jen sincerajn kaj korajn memorojn. Sed se ĉe tia angla tablorondo mi rigardas al ĉiuj tiuj punktoj, rubandoj, ringoj, pomaditaj haroj kaj silkaj roboj, mi ĉiam pensas: kiom da vivantaj virinoj feliĉas kaj feliĉigas aliajn per siaj kostumoj? Stranga estas la penso, kiom multaj amikoj kaj amantoj eble sidas kune ĉi tie sen scii ĝin. Dio scias kial ili neniam scios ĝin kaj ne donas unu al la alia tiun feliĉon, kiun ili tiel facile povus doni kaj kiun ili tiom deziras.

### Tria sceno: La strat-kantisto

Kiel ĉiam post tiaj vespermanĝoj mi sentas min malgaje. Ne fininte mian deserton, mi forlasis la tablon kaj iris en la urbon kun sufiĉe malbona humoro. La mallarĝaj, malpuraj, nelumigitaj stratetoj, la butikoj, kiuj ĵus fermiĝis, la renkontoj kun ebriaj laboristoj kaj kun virinoj, kiuj alportis akvon, kaj kun aliaj virinoj, kiuj surhavis ĉapelojn, kaj, konstante ĉirkaŭrigardante, kiel ŝtelistoj glitis laŭ la muroj tra la stratetoj, ne sukcesis forpeli mian sombran humoron, male, ili nur plifortigis ĝin. Estis jam tre mallume, kiam, sen ĉirkaŭrigardi kaj sen ajna penso en la kapo, mi iris hejmen, esperante, ke la dormo liberigos min de la malgaja humoro. Mi sentis teruran internan malvarmon, solecon kaj pezon, kiel oni sentas ĝin fojfoje sen evidenta kialo, kiam oni translokiĝis al nova loko.

Kiam, sen rigardi dekstren aŭ maldekstren, mi transiris al la kajo por atingi la Ŝvejcerohofon, min subite ravis sonoj de stranga, sed ege plaĉa kaj dolĉa muziko. Ĉi tiuj sonoj tuj revigligis min, kvazaŭ hela, serena lumo penetras mian animon. Mi eksentis min bone, gaje. Mia dormema atento vekiĝis kaj direktis min denove al ĉiuj ĉirkaŭaj objektoj. Kaj la beleco de la nokto kaj de la lago, al kiu mi antaŭe indiferentis, subite surprizis min kiel io tute nova.

Post momento mi vole nevole rimarkis la nubajn, grizajn pecojn sur la malhelblua ĉielo, lumigitajn de la leviĝanta luno, kaj la glatan malhelverdan lagon kun la lumoj reflektitaj en ĝi, la nebulecajn montojn en la malproksimo, la kriojn de la ranoj el Ranburgo kaj la humi-

<sup>7</sup> Poemo de 14 mil versoj skribita de la itala verkisto Dante Alighieri inter la jaroj 1307 kaj 1321 (vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/La\\_Divina\\_Commedia](https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Divina_Commedia)).

<sup>8</sup> Kiam Tolstoj verkis ĉi-rakonton, la Tuilerioj estis palaco de la francaj reĝoj en Parizo; ĝi estis forbruligita en 1871 de la Komunumaj trupoj; restis parko kun ĝardeno (vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Tuileries>).

dan freŝan fajfadon de koturnoj de la alia lagoflanko. Rekte antaŭ mi, en la loko, de kie aŭdiĝis la sonoj kaj al kiu mia atento estis prioritare direktita, mi vidis en la duonmallumo meze de la strato duonrondan heziteman homamason kaj antaŭ ĝi, iom malproksime, etan viron en nigraj vestaĵoj.

Malantaŭ la homamaso kaj la vireto, kontraŭ la disŝirita malhelgriz-blua ĉielo apartiĝis de la ĝardeno pluraj nigraj poploj, kaj ambaŭflanke de la antikva katedralo majeste leviĝis du severaj turoj.<sup>9</sup>

Mi alproksimiĝis, la sonoj fariĝis pli klaraj. Mi povis klare distingi la malproksimajn kaj plenajn akordojn de gitaro, kiuj dolĉe vibris en la vespera aero, kaj iujn voĉojn, kiuj alternante unu la alian, ne kantis la temon, sed nur emfazis la plej ĉefajn erojn. La temo estis io simila al dolĉa kaj gracia mazurko. La voĉoj ŝajnis jen proksimaj, jen malproksimaj, jen aŭdiĝis tenoro, jen baso, jen gorga fistula voĉo kun kverantaj tirolaj trilaĵoj. Ĝi ne estis kanto, sed leĝera majstra skizo de kanto. Mi ne povis kompreni, kio ĝi estas, sed ĝi estis belega. Ĉi tiuj voluptaj feblaj akordoj de la gitaro, ĉi tiu dolĉa, malpeza melodio kaj ĉi tiu soleca figureto de la nigra hometo meze de la fantazia aranĝo de la malhela lago, la brilanta luno kaj la du grandegaj, silente leviĝantaj turoj kaj nigraj poploj de la ĝardeno – ĉio ĉiestis stranga, sed neesprimeble belega, aŭ ĝi ŝajnis al mi tiel.

Ĉiuj konfuzaj spontanaj impresoj de la vivo subite akiris por mi signifon kaj ĉarmon. Freŝa bonodora floro ŝajnis prosperi en mia animo. Anstataŭ laceco, malkoncentreco, indiferecenteco al ĉio en la mondo, kiujn mi spertis minuton antaŭe, mi subite sentis la bezonon de la amo, plena espero kaj senkaŭza vivĝojo. Kion mi volas, kion mi deziras? – diriĝis al mi vole nevole, – de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas vin beleco kaj poezio. Enspiru ĝin seeble per larĝa plena forto, ĝuu, kion alian vi bezonas! Ĉio estas via, ĉio estas bona ...

Mi alproksimiĝis. La malgranda vireto estis, ŝajne, vaganta tirolano.<sup>10</sup> Li staris antaŭ la fenestroj de la hotelo kaj, tenante unu kruron antaŭen, la kapo ĵetita malantaŭen kaj tintigante sian gitaron, kantis sian gracion kanton per diversaj voĉoj. Mi tuj sentis teneron por ĉi tiu viro kaj danke-mon pro la emocia renverso, kiun li kaŭzis al mi.

La kantisto, kiom mi povis vidi, portis malnovan nigran redingoton, havis mallongajn nigrajn harojn, kaj sur lia kapo estis ege filistra, simpla malnova ĉapo. Liaj vestaĵoj havis nenion artistan, sed la impeta, infanece gaja pozo kaj la movoj faris, kun lia eta staturo, kortuŝan kaj samtempe amuzan vidaĵon. Ĉe la enirejo, en la fenestroj kaj sur la balkonoj de la grandioze lumigita hotelo staris brilantaj kostumportantoj, sinjorinoj kun larĝaj juvoj, sinjoroj kun blankegaj kolumoj, la pordisto kaj lakeo en orbreditaj livreoj. Sur la strato, en duoncirklo de la homamaso kaj pli longe laŭ la bulvardo, inter la tilioj, kolektiĝis kaj haltis elegante vestitaj kelneroj, kuiristoj kun blankegaj ĉapoj kaj jakoj, knabinoj, kiuj ĉirkaŭbrakis unu la alian, kaj promenantoj. Ŝajnis, ke ĉiuj spertis la saman senton kiel mi. Ĉiuj staris silente ĉirkaŭ la kantisto kaj aŭskultis lin atente. Ĉio estis trankvila, nur en la paŭzoj inter la strofoj, de malproksime, trans la lago alvenis sonoj de martelo kaj la diseriga trilado de la ranoj el Ranburgo, interrompita de la malseka unusona fajfado de koturnoj.

En la mallumo meze de la strato la vireto elverŝis kiel najtingalo verson post verso kaj kanton post kanto. Malgraŭ tio, ke mi nun staris rekte apud li, lia kantado daŭre faris al mi grandan plezuron. Lia voĉeto estis ege plaĉa, la tenero, gusto kaj proporciosento, per kiuj li regis sian voĉon, estis nekutimaj kaj montris grandan naturan talenton. La refrenon post ĉiu verso li ĉiam kantis alimaniere, kaj estis evidente, ke ĉiujn ĉi graciajn variaĵojn li produktis spontane kaj rapide.

<sup>9</sup> Temas pri la katedralo Hofkirche de Sankta Leodegaro (vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/St.\\_Leodegar\\_im\\_Hof](https://de.wikipedia.org/wiki/St._Leodegar_im_Hof)).

<sup>10</sup> Evidente li ne estis tirolano, sed sviso. La aŭtoro probable nomis lin tirolano, ĉar li konsideris liajn kantojn tirolaj, vd. piednoton 11.

En la homamaso, kaj en la Ŝvejcerhofo kaj sur la bulvardo, ofte aŭdiĝis aproba flustro kaj regis respektema silento. Sur la balkonoj kaj en la fenestroj multiĝis pli kaj pli bele kostumitaj viroj kaj virinoj, kiuj apogis sin sur siaj kubutoj pitoreske en la brilo de la domaj lumoj.

La promenantoj haltis, kaj ĉie sur la kajo grupiĝis viroj kaj virinoj sub la ombro de la tilioj.

Apud mi, iom aparte de la tuta homamaso, staris la lakeo kaj la kuiristo, kiuj aspektis kiel aristokratoj kaj fumis cigarojn. La kuiristo forte sentis la ĉarmon de la muziko, kaj ĉe ĉiu alta fistula noto li palpebrume signis per la kapo entuziasme kaj iom perplekse al la lakeo, kiun li puŝetis per la kubuto kun mieno, kiu celis diri: kia poeto, ĉu ne? La lakeo, el kies plena rideto mi rimarkis la tutan plezuron, kiun li sentis, respondis al ĉiu puŝeto de la kuiristo per levo de la ŝultroj, kiu celis montri, ke estas sufiĉe malfacile surprizi lin kaj ke li aŭdis multe pli bonan ol tio.

Inter la kantoj, kiam la kantisto tusetis, mi demandis la lakeon, kiu li estas kaj ĉu li ofte venas ĉi tien.

- „Jes, somere li venas ĉirkaŭ dufoje – la lakeo respondis, – li estas el Argovio.<sup>11</sup> Tiel li vagabondas, petante monon.“
- „Ĉu multaj de tiu speco venadas?“ mi demandis.
- „Jes, jes – la lakeo respondis, ne tuj kompreninte, pri kio mi demandis; sed poste kompreninte mian demandon, li aldonis: – Ho ne! Ĉi tie mi vidas nur lin. Ne pli.“

En tiu ĉi momento la vireto finis la unuan kanton, lerte turnante la gitaron, kaj diris ion pri si mem en sia germana dialekto, kion mi ne povis kompreni, sed kio provokis ridon en la ĉirkaŭa homamaso.

- „Kion li diras?“ mi demandis.
- „Li diras, ke lia gorĝo sekiĝis kaj ke li volonte trinkus glason da vino“, tradukis por mi la lakeo, kiu staris apud mi.
- „Ŝajnas, ke li ŝatas trinki pli ol necese.“
- „Jes, tiuj homoj estas tiaj“, la lakeo respondis per rideto, mansvinge montrante al li.

La kantisto demetis sian ĉapon kaj, svingante sian gitaron, aliris la domon. Reĵetinte la kapon, li turnis sin al la gesinjoroj, kiuj staris ĉe la fenestroj kaj sur la balkonoj: „*Messieurs et mesdames* – li diris per duonitala, duongermana akĉento kaj kun la intonacio, per kiu magiistoj alparolas la publikon – *si vous croyez, que je gagne quelque chose, vous vous trompez; je ne suis qu'un pauvre tiaple*“<sup>12</sup>. Li atendis, dume silentis; sed ĉar neniu donis al li ion, nome iom da mono, li denove kaptis sian gitaron kaj diris: „*A présent, messieurs et mesdames, je vous chanterai l'air du Rigi*“<sup>13</sup>. Supre la publiko silentis, sed daŭre staris atendente la sekvan kanton. Sube en la homamaso oni ridis verŝajne pro la fakto, ke li esprimis sin tiel strange kaj ke li nenion ricevis. Mi donis al li kelkajn centimojn, li lerte ĵetis ilin de mano al mano, metis ilin en sian vestan poŝon kaj, surmetinte sian ĉapon, denove komencis kanti gracion, dolĉan tirolan kanton, kiun li nomis *l'air du Rigi*. Ĉi tiu kanto, kiun li rezervis por la fino, estis eĉ pli bona ol ĉiuj antaŭaj, kaj sonoj de aprobo aŭdiĝis de ĉiuj flankoj en la kreskanta homamaso. Li finis. Denove li svingis sian gitaron, demetis sian ĉapon, metis ĝin antaŭ si, alproksimiĝis al la fenestroj je du ŝtupoj kaj denove diris sian nekompreneblan frazon: „*Messieurs et mesdames, si vous croyez, que je gagne quelque chose ...*“, – kiun li evidente konsideris tre lerta kaj sprita, sed en liaj voĉo kaj movoj mi nun rimarkis certan hezitemon kaj infanecan timemon, kio aparte impresis pro lia eta staturato. La eleganta publiko daŭre staris pitoreske en la brilo de la

<sup>11</sup> Svisa kantono en la norda, alemana landoparto.

<sup>12</sup> Franclingve: Se vi pensas, ke mi gajnas ion ajn, vi eraras; mi estas nur malriĉa ulo.

<sup>13</sup> Franclingve: Nun, gesinjoroj, mi kantas al vi la Rigi-kanton.

lumoj sur la balkonoj kaj en la fenestroj, brilante per riĉaj vestaĵoj; iuj parolis inter si per modere deca voĉo evidente pri la kantisto, kiu staris antaŭ ili kun etendita mano, aliaj rigardis atente kaj kun scivolemo malsupren al tiu malgranda nigra figureto, sur unu el la balkonoj aŭdiĝis sonora kaj gaja rido de juna knabino. Ĉiam pli laŭta en la suba homamaso estis la parolado kaj ridado. La kantisto ripetis sian frazon la trian fojon, sed nun per pli malforta voĉo, eĉ ne finante ĝin, kaj denove etendis sian manon kun la ĉapo, sed tuj lasis fali ĝin.

Kaj por la dua fojo neniu el ĉi tiuj centoj da brile vestitaj homoj, kiuj amasiĝis por aŭskulti lin, ĵetis al li eĉ nur unu groŝon. La homamaso ridaĉis senkompate. La malgranda kantisto, ŝajnis al mi, fariĝis eĉ pli malgranda, ŝrumpis, prenis la gitaron en la alian manon, levis sian ĉapon super la kapo kaj diris: „*Messieurs et mesdames, je vous remercie et je vous souhaite une bonne nuit*“<sup>14</sup> – kaj surmetis la ĉapon. La homamaso klukis per ĝoja ridado. Iom post iom la belaj viroj kaj damoj retiris sin de la balkonoj, kviete parolante inter si. Sur la bulvardo rekomenciĝis la promenado. Silenta dum la kantado, la strato reviviĝis, nur kelkaj homoj observis la kantiston de malproksime, sen alproksimiĝi al li, kaj ridis. Mi aŭdis la vireton diri ion en sia barbo, sed li turniĝis, kvazaŭ fariĝis eĉ pli malgranda kaj marŝis per rapidaj paŝoj al la urbo. La gajaj promenujoj, kiuj observis lin, ankoraŭ sekvis lin de certa distanco kaj ridis ...

Mi tute konfuziĝis, ne komprenante, kion ĉio ĉi signifas, kaj staris sur la sama loko, sence rigardante en la mallumon, al la foriranta eta viro, kiu kun grandaj paŝoj rapide marŝis al la urbo, kaj al la ridantaj promenantoj, kiuj sekvis lin. Mi sentis doloron, amaron, kaj, plej grave, honton por la vireto, pro la homamaso, pri mi mem, kvazaŭ mi mem petis monon kaj oni nenion donis al mi kaj ridis pri mi. Sen retrorigardi, kun premita koro, mi reiris per rapidaj paŝoj al mia domo sur la verandon de la Ŝvejcerhofo. Mi ankoraŭ ne raportis al mi, kion mi spertis, nur io peza, nesolvita plenigis mian animon kaj premis min.

Ĉe la grandioza, bone lumigita enirejo mi renkontis la pordiston, kiu ĝentile paŝis flanken, kaj anglan familion.

La forta, bela kaj alta viro kun nigra angla vangobarbo, nigra ĉapelo kaj plejdo sur la mano, en kiu li tenis valoran promenbastonon, pigre, memfide marŝis brako en brako kun damo en sovaĝa silka robo, kun brilaj rubandoj en la kufeto kaj belegaj punktoj. Apud ili marŝis bela, freŝa fraŭlino kun gracia svisa ĉapelo kun plumo ‘à la mousquetaire’,<sup>15</sup> de sub kiu molaj longaj, helblondaj bukloj falis ĉirkaŭ ŝia blanka vizaĝo. Antaŭen saltis dekjara ruĝeta knabino kun plenaj blankaj genuoj videblaj sub la maldikaj puntopantalonoj.

– „Bela nokto“, la sinjorino diris per dolĉa, feliĉa voĉo, kiam mi preterpasis ŝin.

„Ho“ pigre murmuris la anglo, kiu, ŝajne, estis tiel feliĉa vivi en la mondo, ke li eĉ ne emis paroli. Kaj ankaŭ al ĉiuj ceteraj ŝajnis, ke estis tiel trankvile, komforte, pure kaj facile vivi en la mondo. Iliaj movoj kaj vizaĝoj esprimis indiferecon al iu ajn alia estaĵo kaj certecon pri tio, ke la pordisto nepre paŝos flanken, klinos sin kaj riverencos al ili, ke ĉe la reveno ili trovos purajn litojn kaj trankvilajn ĉambrojn kaj ke ĉio ĉi devas esti tiel, ke je ĉio tio ili havas plenan rajton, – ke en mia menso mi tuj vole nevole kontraŭmetis al ili la vagantan kantiston, kiu, laca, eble malsata, nun forfuĝis kun honto de la ridanta homamaso, – mi komprenis, kio premis mian koron kiel peza ŝtono, sentante neesprimeblan koleron kontraŭ tiuj homoj. Mi preterpasis la anglon dufoje kun neesprimebla plezuro kaj ne ĉirkaŭante lin, sed puŝetante lin per mia kubuto, kaj tra la enirejo kuris en la mallumon al la urbo, kien la vireto malaperis.

<sup>14</sup> Franclingve: Gesinjoroj, mi dankas vin kaj deziras al vi bonan nokton.

<sup>15</sup> Franclingve: Kiel musketero (komp. muskedisto, PIV).

## Kvara sceno: Renkontiĝo de la aŭtoro kun la kantisto en la hotela trinkejo

Mi atingis tri homojn, kiuj marŝis kune, kaj mi demandis ilin, kie la kantisto estas. Ridante, ili montris al mi, ke li iris antaŭ ili. Li marŝis sola, kun rapidaj paŝoj, neniuj alproksimiĝis al li, kaj li kolere murmuris ion, kiel ŝajnis al mi. Mi atingis lin kaj invitis lin iri ien por trinki botelon da vino. Li marŝis same rapide kaj malkontente rigardis min; sed, kompreninte, pri kio temas, li haltis.

– „Nu, mi ne rifuzos, se vi estas tiel afabla – li diris, – ĉi tie estas malgranda simpla kafejo, ĝin oni povas viziti“, li aldonis, montrante al iu drinkejo, kiu ankoraŭ estis malfermata.

Lia vorto „simpla“ vole nevole kondukis min al la ideo ne iri al simpla kafejo, sed reiri al la Ŝvejcerhofo, kie estis tiuj, kiuj aŭskultis lin. Malgraŭ tio, ke li rifuzis la Ŝvejcerhofon plurfoje kun timema ekscitiĝo, dirante, ke ĝi estas tro eleganta, mi insistis pri mia propono, kaj, kiam ŝajnis, ke li tute ne estas embarasita, li feliĉe svingis sian gitaron kaj marŝis kun mi reen laŭ la kajo. Tuj kiam mi kuniĝis kun la kantisto, pluraj festantaj promenujoj proksimiĝis por aŭskulti, kion mi diris, kaj, diskutante inter si, sekvis nin ĝis la enirejo probable por atendi iun novan prezentaĵon de la tirolano.<sup>16</sup>

Ĉe la unua kelnero, kiun mi renkontis ĉe la enirejo, mi mendis botelon da vino. La kelnero ridetis kaj rigardis nin kaj, sen respondi, preterkuris. La ĉefkelnero, al kiu mi turnis min kun la sama peto, serioze aŭskultis min kaj, rigardante la timeman, malgrandan figuron de la kantisto de la kapo ĝis la piedoj, severe diris al la pordisto, ke li konduku nin en la maldekstran salonon. La salono maldekstre estis drinkejo por la simpla popolo. En la angulo de ĉi tiu ĉambro, en kiu ĉiuj mebloj konsistis el nudaj lignaj tabloj kaj benkoj, iu ĝiba servistino lavis telerojn kaj glasojn. La kelnero, kiu devis servi nin, rigardis nin per milda, moka rideto, kaj interparolis, la manoj en la poŝoj, kun la ĝiba servistino. Ŝajnas, ke li celis signi al ni, ke, rilate la proprajn socian statuson kaj dignon li sentas sin nemezureble pli altranga ol la kantisto, kaj ke estas al li ne nur hontinde, sed ankaŭ amuze servi nin.

– „Ĉu vi ŝatus simplan vinon?“ li diris kun komprenema rigardo, palpebrumis al mi pro mia akompananto kaj ĵetis la buŝtukon de mano al mano.

– „Ĉampanon, kaj la plej bonan!“ mi diris, provante alpreni fieregan kaj majestan mienon. Sed nek la ĉampano, nek mia supozeble tro fiera kaj majesta mieno impresis la lakeon; li ridetis, restis staranta iomete kaj rigardis nin, malrapide rigardis la oran horloĝon kaj per kvietaj paŝoj, kvazaŭ li irus promeni, forlasis la salonon. Baldaŭ li revenis kune kun la vino kaj ankoraŭ du pliaj lakeoj. Ili sidiĝis en la angulo de la lavistino kaj kun gaja atento kaj milda rideto sur la vizaĝo admiris nin, kiel gepatroj admiras siajn belajn infanojn kiam ili bele ludas. Nur la ĝiba lavistino ŝajnis rigardi nin ne moke, sed kun kompatato. Kvankam por mi estis tre malfacile kaj embarase konversacii kun la kantisto kaj regali lin sub la kritika ekzamena rigardado de tiuj lakeoj, mi klopodis plenumi mian taskon kiel eble plej memstare. Ĉe la lumo mi vidis lin pli bone. Li estis eta, proporcie konstruita, drateca viro, preskaŭ nano, kun hirtaj nigraj haroj, grandaj, ĉiam plorantaj nigraj okuloj, sen okulharoj, kaj ege plaĉa, dolĉe faldita buŝeto. Li havis malgrandan vangobarbon, liaj haroj estis mallongaj, liaj vestaĵoj estis ege simplaj kaj malriĉaj. Li estis malpura, ĉifona, sunbruligita kaj ĝenerale aspektis kiel laboristo. Li pli similis al malriĉa komercisto ol al artisto. Nur en la konstante malsekaj, brilaj okuloj kaj en la stranga faldita buŝo estis io originala kaj kortuŝa. Laŭ aspekto li povis esti dudek kvin ĝis kvardek jara; efektive li estis tridek ok.

Jen kion li rakontis pri sia vivo kun bonkora preteco kaj evidenta sincereco. Li estis el Argovio.<sup>17</sup> Ankoraŭ en la infanaĝo li perdis siajn gepatrojn, aliajn parencojn li ne havis.

<sup>16</sup> Vd. piednoton 10.

<sup>17</sup> Vd. piednoton 11.

Ankaŭ personan posedaĵon li neniam havis. Li lernis la metion de lignaĵisto, sed antaŭ dudek du jaroj li havis ostan malsanon en la mano, kiu malebligis al li labori. De la infanaĝo li ŝatis la kantadon kaj komencis kanti. Eksterlandanoj donis al li monon de tempo al tempo. Li faris profesion el ĝi, aĉetis gitaron kaj jam dek ok jarojn vagadis tra Svislando kaj Italujo, kie li kantas antaŭ hoteloj. Lia tuta bagaĝo konsistis el la gitaro kaj monujo, en kiu li nun havis nur unu kaj duonon da franko, kiun li devis uzi por dormi kaj manĝi en ĉi tiu vespero. Ĉiujare, jam dek ok fojojn, li trapasas ĉiujn plej bonajn, plej vizitatajn lokojn en Svislando: Zurikon, Lucernon, Interlaken, Chamonix<sup>18</sup> ktp. Tra Sankta Bernardo li transiras al Italujo kaj revenas tra Sankta Gotardo aŭ tra Savojo.<sup>19</sup> Nun li malfacile marŝis, ĉar li malvarmumiĝis kaj sentis doloron en la kruroj, kiun li nomas 'Gliedersucht'<sup>20</sup>, kio plimalboniĝas ĉiujare, tiel ke liaj okuloj kaj voĉo fariĝas pli malfortaj. Malgraŭ tio li nun vojaĝos al Interlaken, Aix-les-Bains kaj, tra la malgranda Sankta Bernardo, al Italujo, kiun li aparte ŝatas.<sup>21</sup> Ĝenerale ŝajnis, ke li estas tre feliĉa kun sia vivo. Kiam mi demandis lin kial li revenas hejmen, ĉu li havas parencojn, domon aŭ bienon tie, lia buŝeto faldiĝis al gaja rideto kaj li respondis al mi:

– „*Oui, le sucre est bon, il est doux pour les enfants!*“<sup>22</sup> kaj li palpebrumis al la lakeoj.

Mi komprenis nenion, sed la lakeoj ridis.

– „Mi havas nenion, ĉu alie mi vagadus tiel? – li klarigis al mi, – sed mi revenas hejmen, ĉar ĉiukaze io retiras min al la patrujo.“

Kaj denove, kun ruza, memkontenta rideto, li ripetis la frazon: „*Oui, le sucre est bon*“, kaj ridis bonkore. La lakeoj estis tre kontentaj kaj ridis, nur la ĝiba servistino serioze rigardis la vireton kun grandaj bonkoraj okuloj kaj levis lian ĉapon, kiu falis de la benko dum la interbabilado. Mi rimarkis, ke vagantaj kantistoj, akrobatoj, eĉ magiistoj ŝatas nomi sin artistoj, kaj tial mi plurfoje aludis al mia kunparolanto, ke li estas artisto, sed li tute ne rekonis ĉi tiun kvaliton por si mem, konsiderante sian metion tutsimple vivrimedo. Kiam mi demandis lin, ĉu li mem komponas la kantojn, kiujn li kantas, li miris pri tia stranga demando kaj respondis, ke tio ne estas lia kompetento kaj ke temas pri malnovaj tirolaj kantoj.

– „Sed kio do pri la Rigi-kanto? Mi pensas, ke ĝi ne povas esti malnova“, mi diris.

– „Jes, ĝi estis komponita antaŭ dek kvin jaroj. Estis iu germano en Bazelo, ege inteligenta viro, kiu skribis ĝin.“<sup>23</sup> Bonega kanto! Sciu, ke li verkis ĝin por la vojaĝantoj.“

Kaj li komencis, kun franca traduko, klarigi al mi la vortojn de la Rigi-kanto, kiun li evidente tre ŝatis:

*Se vi volas iri sur la monton Rigi,  
Ĝis Weggis<sup>24</sup> ŝuojn oni ne bezonas,  
(Ĉar tien oni veturas per vaporŝipo),  
Sed de Weggis prenu grandan bastonon,  
Kaj prenu ankoraŭ knabinon ĉe la brako,*

<sup>18</sup> Chamonix tamen estas jam en Francio.

<sup>19</sup> Savojo estas regiono en la francaj Alpoj.

<sup>20</sup> Germanlingve: Neŭralgiaj doloroj en la artikoj aŭ muskola reŭmatismo.

<sup>21</sup> Interlaken estas turisma urbo en la bernaj Alpoj, Aix-les-Bains estas franca urbo en Savojo, Sankta Gotardo kaj Sankta Bernharo estas du gravaj montpasejoj en la svisaj Alpoj.

<sup>22</sup> Franclingve: Jes, la sukero estas bona, ĝi estas agrabla por infanoj.

<sup>23</sup> La t.n. Rigi-kanto *Vo Lozärn uf Wäggis zue* estis verkita de Johann Lüthi, kiu estis Solothurn-ano, post ekskurso sur la monton Rigi en julio 1832 (vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Lüthi](https://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Lüthi)).

<sup>24</sup> Vilaĝo borde de la Kvarkantona Lago kaj piede de la monto Rigi.



*Kaj venu trinki glason da vino.*

*Sed ne trinku tro multe,*

*Ĉar tiu, kiu volas trinki vinon,*

*Devas ĝin unue meriti ...*<sup>25</sup>

– „Ho, bonega kanto!“ li konkludis.

Ankaŭ la lakeoj probable trovis ĉi tiun kanton tre bona, ĉar ili alproksimiĝis al ni.

– „Nu, kaj kiu komponis la muzikon?“ mi demandis.

– „Ho, neni, tiel estas, sciu, ke por kanti por eksterlandanoj oni bezonas ion novan.“

Kiam ili alportis al ni glacion kaj mi verŝis glason da ĉampano por mia kunparolanto, li ŝajne sentis embarason, kaj, retrorigardante al la lakeoj, turnis sin sur sia benko. Ni tintigis la glasojn je la sano de la artistoj; li trinkis duonan glason kaj iĝis pensema, movante siajn brovojn.

– „Pasis longa tempo, de kiam mi trinkis tian vinon, *je ne vous dis que ça*.<sup>26</sup> En Italujo, la vino de Asti estas bona, sed ĉi tiu estas ankoraŭ pli bona. Ho, Italujo! Plaĉas al mi esti tie!“ li aldonis.

– „Jes, tie ili scipovas estimi muzikon kaj artistojn,“ mi diris kun la intenco rememorigi lin pri la vespera fiasko antaŭ la Ŝvejcerohofo.

– „Ne – li respondis, – tie mi povas plezurigi neniun per mia muziko. La italoj mem estas muzikistoj kiel ili nenie ekzistas en la tuta mondo; sed mi parolas nur pri la tirolaj kantoj. Tio tamen estas io nova por ili.“

– „Ĉu tie la gesinjoroj ne estas pli grandanimaj? – mi daŭrigis, celante devigi lin dividi mian rankoron kontraŭ la loĝantoj de la Ŝvejcerohofo, – tie ne okazas tiaj aferoj kiel ĉi tie, ke en grandega hotelo, kie loĝas riĉuloj, cent homoj aŭskultas la artiston kaj neni donas al li ion ajn.“

Mia demando ne efikis kiel mi atendis. Li eĉ ne intencis indigni kontraŭ ili; male, en mia rimarkigo li vidis riproĉon kontraŭ sia talento, kiu ne gajnis rekompencan, kaj provis pravigi sin antaŭ mi.

– „Ne ĉiufoje oni ricevas multon“ – li respondis – „foje la voĉo malaperas aŭ oni laciĝas; tiel ankaŭ hodiaŭ mi pasigis naŭ horojn kaj kantis preskaŭ la tutan tagon. Estas malfacile. Kaj la gravaj gesinjoroj-aristokratoj ne ĉiam volas aŭskulti tirolajn kantojn.“

– „Tamen, kiel eblas doni nenion?“ mi ripetis.

Sed li ne komprenis mian rimarkigon.

– „Ne temas pri tio – li diris, – la ĉefa problemo ĉi tie estas, ke *on est très serré par la police*,<sup>27</sup> jen. Ĉi tie, laŭ la respublikaj leĝoj, oni ne rajtas kanti, sed en Italujo oni povas kiom ofte kaj longe oni volas, neni diros al vi eĉ unu vorton. Ĉi tie, se ili volas lasi vin, ili lasos vin, sed se ili ne volas, ili povas meti vin en la malliberejon.“

<sup>25</sup> La originan tekston en la alemana lingvo vd. sub <https://www.weggis-vitznau.ch/de/ferienorte/weggis/vo-lozaern-gaegel-waeggis-zue>. La koncernan melodion oni trovas sub <https://www.youtube.com/watch?v=HTvjbiILSYg> aŭ <https://www.youtube.com/watch?v=WuViv0BGvMw>.

<sup>26</sup> Franclingve: Tion mi diras (aŭ rakontas) al vi nur.

<sup>27</sup> Franclingve: Oni estas multe ĉikanata de la polico.

– „Kiel do, ĉu vere?“

– „Jes, certe. Se ili rimarkis vin unufoje kaj vi daŭrigas kanti, vi povas esti enkarcerigita. Mi jam estis en malliberejo dum tri monatoj,” li diris, ridetante, kvazaŭ tio estus unu el liaj plej plaĉaj memoroj.

– „Ho, ĉi tio estas terura!“ – mi diris, – pro kio do?“

– „Tiel okazas ĉe ili laŭ la novaj leĝoj de la respubliko<sup>28</sup> – li daŭrigis, reentuziasmigante sin, – ili ne volas agnoski, ke ankaŭ la malriĉulo devas iel vivi. Se mi ne estus kriplulo, mi laborus. Kaj kiam mi kantas, ĉu mi faras iun damaĝon al iu ajn per tio? Kio estas tio? La riĉuloj vivu tiel, kiel ili volas, kaj *un pauvre tiaple*<sup>29</sup> ne povu vivi. Kiaj estas ĉi tiuj leĝoj de la respubliko? Se estas tiel, tiam ni ne volas respublikon, ĉu ne, sinjoro moŝto? Ni ne volas respublikon, sed ni volas ... ni nur volas ... ni volas ... – li iom hezitis, ni volas naturajn leĝojn.“

Mi plu verŝis al li en lian glason.

– „Vi ne trinkas,“ mi diris al li.

Li prenis la glason en la manon kaj riverencis antaŭ mi.

– „Mi scias, kion vi volas – li diris, strabe rigardante al mi kaj minacante min per sia fingro, – vi volas ebriigi min, vidi, kio okazos al mi, sed ne, vi ne sukcesos.“

– „Kial mi ebriigu vin – mi diris, – mi nur deziris plezurigi vin.“

Li verŝajne bedaŭris, ke li ofendis min, false interpretante mian intencon. Li embarasiĝis, ekstaris kaj kaptis mian kubuton.

– „Ne, ne – li diris, rigardante min per siaj malsekaj okuloj kun petega mieno, – mi nur ŝercis“.

Kaj post tio li eldiris iun terure konfuzan, ruzan frazon, kiu laŭsupoze signifis, ke mi tamen estas ja bona ulo.

– „*Je ne vous dis que ça!*“<sup>30</sup> li konkludis.

Tiel mi daŭrigis trinki kaj paroli kun la kantisto, kaj la lakeoj daŭrigis senhezite admirin kaj, kiel ŝajnis, kokete provoketi nin.

## Kvina sceno: La kolera gasto

Malgraŭ la intereso pri nia konversacio, mi ne povis ne rimarki ilin kaj, mi konfesas, pli kaj pli koleriĝis. Unu el ili ekstaris, iris al la vireto kaj, rigardante lian verton, komencis rideti. Mia kolero kontraŭ la loĝantoj de la Ŝvejcerhofo, kiu amasiĝis, jam estis preta por disŝiri iun ajn el ili, sed mi ankoraŭ ne havis la okazon, kaj nun, mi konfesas, ĉi tiu lakea publiko incitis min ankoraŭ pli. Sen demeti sian ĉapon, la pordisto eniris la salonon kaj, apoginte siajn kubutojn sur la tablon, sidiĝis apud mi. Ĉi tiu cirkonstanco eksplodigis mian koleron, kiu kolektiĝis en mi la tutan vesperon. Kial ĉe la enirejo, kiam mi estas sola, tiu pordisto humile riverencas antaŭ mi, kaj nun, kiam mi sidas kun vaganta kantisto, li senĝene sidiĝas apud mi? Mi estis tute furioza pro tiu bolanta kolero de indigno, kiun mi ŝatas en mi mem; mi ekscitiĝas eĉ, kiam tiu kolero troviĝas ĉe mi, ĉar ĝi havas trankviligan efikon sur min kaj donas al mi, almenaŭ dum mallonga tempo, iom da eksterordinaraj flekseblo, energio kaj forto de ĉiuj fizikaj kaj moralaj kapabloj. Mi eksaltis.

<sup>28</sup> Aludo al la konstitucio de la Svisa Respubliko de 1848.

<sup>29</sup> Vd. piednoton 12.

<sup>30</sup> Vd. piednoton 25.

– „Pri kio vi ridas?“ mi kriis al la lakeo, sentante mian vizaĝon paliĝi kaj miajn lipojn tremi sen intenco.

– „Mi tute ne ridas,“ la lakeo respondis, retropaŝante de mi.

– „Vi ridas pri ĉi tiu sinjoro. Kaj kian rajton vi havas esti kaj sidi ĉi tie, kiam gastoj estas ĉi tie? Ne sidu, ĉi tie!“ mi kriis.

Grumblante, la pordisto ekstaris kaj moviĝis al la pordo.

– „Kian rajton vi havas ridi pri ĉi tiu sinjoro kaj sidi apud li, kiam li estas gasto kaj vi estas lakeo? Kial vi ne ridis pri mi dum la vespermanĝo hodiaŭ kaj sidis apud mi? Ĉu pro tio, ke li estas malbone vestita kaj kantas sur la strato? Ĉu pro tio, ĉar mi portas belan robon? Li estas malriĉa, sed miloble pli bona ol vi, mi certas pri tio. Ĉar li nenium insultis kaj vi insultas lin.“

– „Mi faris nenion al li, kion vi volas? – timeme respondis mia malamiko, la lakeo, – ĉu mi malhelpas al li sidi?“

La lakeo ne komprenis min kaj mia germana parolo estis malŝparita. La malĝentila pordisto defendis la lakeon, sed mi atakis lin tiel haste, ke ankaŭ la pordisto ŝajnis ne kompreni min, kaj svingis sian manon. La ĝiba lavistino – ne estis klare, ĉu ŝi rimarkis mian varmigitan emocistaton kaj timis skandalon, aŭ ĉu ŝi dividis mian opinion, – apogis mian flankon kaj, penante stari inter mi kaj la pordisto, persvadis lin silenti, dirante, ke mi pravas, kaj petis min trankviliĝi. – „*Der Herr hat Recht; Sie haben Recht*“<sup>31</sup> – ŝi ripetis. La kantisto reprezentis la plej kompatindan, timigitan vizaĝon kaj, ŝajne ne komprenante, pro kio mi ekscitiĝis kaj kion mi volis, petis min foriri kiel eble plej baldaŭ.

Sed en mi ekflamis pli kaj pli kolera parolemo. Mi memoris ĉion: kaj la homamason, kiu ridis pri li, kaj la aŭskultantojn, kiuj nenion donis al li, do mi neniel volis trankviliĝi. Mi pensas, ke se la kelneroj kaj la pordisto ne estintus tiel cedemaj, mi batalintus kun ĝuo kun ili aŭ mi batintus sendefendan anglan damon per bastono sur la kapon. Se en tiu momento mi estintus en Sebastopolo, mi volonte estus atakinta per pikado kaj hakado la anglan tranĉeon.<sup>32</sup>

– „Kaj kial vi kondukis min kaj ĉi tiun sinjoron en ĉi tiun kaj ne en la alian salonon, he? – mi esplordemandis la pordiston, kaptante lian manon, por ke li ne eskapu de mi. – „Kian rajton decidi vi havis laŭvide, ke ĉi tiu sinjoro estu en ĉi tiu kaj ne en la alia salono? Ĉu ĉiuj, kiuj pagas, ne estas egalrajtaj en la hoteloj? Ne nur en respubliko, sed en la tuta mondo. Via aĉa respubliko! ... Tiel aspektas via egaleco! La anglojn vi ne estus kuraĝinta konduki en ĉi tiun salonon, tiujn samajn anglojn, kiuj senpage aŭskultis ĉi tiun sinjoron, tio estas, ke ili ĉiuj ŝtelis de li kelkajn centimojn, kiuj estis donotaj al li. Kiel vi kuraĝis sendi nin en ĉi tiun salonon?“

– „La alia salono estas fermita,“ la pordisto respondis.

– „Ne – mi kriis, – ne estas vere, tiu salono ne estas fermita.“

– „Do, vi scias ĝin pli bone.“

– „Mi scias, mi scias, ke vi mensogas.“

La pordisto forturnis sin de mi.

– „Eh, kion mi diru?“ li grumblis.

<sup>31</sup> Germanlingve: La sinjoro pravas, Vi pravas.

<sup>32</sup> Tolstoj aludas al sia partopreno en la defendo de Sebastopolo dum la Krimea milito de 1853-56 (vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Krimea\\_milito](https://eo.wikipedia.org/wiki/Krimea_milito)).

– „Ne, ne ‘kion mi diru’ – mi kriis, – konduku min nun tuj en tiun salonon!“

Malgraŭ la admonoj de la ĝibulino kaj la petoj de la kantisto pli bone iri hejmen, mi postulis voki la ĉefkelneron kaj iris en la alian salonon kun mia kunparolanto. Aŭdante mian koleran voĉon kaj vidante mian ekscititan vizaĝon, la ĉefkelnero ne disputis kun mi kaj diris kun malestima ĝentileco, ke mi povas iri kien ajn mi volas. Mi ne povis pruvi al la pordisto ties mensogon, ĉar li malaperis eĉ antaŭ ol mi eniris la salonon.

La ĉambro estis efektive malfermita, lumigita, kaj ĉe unu el la tabloj sidis unu el tiuj angloj kun sia damo kaj vespermanĝis. Malgraŭ tio, ke oni direktis nin al aparta tablo, mi sidiĝis kun la malpura kantisto apud la angloj kaj ordonis alporti al ni la nefinitan botelon.

La angloj unue surprizite kaj poste kolere rigardis la vireton, kiu sidis apud mi duon-vive; ili diris ion inter si, ŝi flankenpuŝis la teleron, susuris per sia silka robo, kaj ambaŭ malaperis. Malantaŭ la vitraj pordoj mi vidis la anglon diri ion plendan al la kelnero kaj kiel li konstante montris per sia mano al nia direkto. La kelnero klinis sin ekster la pordon kaj trarigardis ĝin. Mi atendis kun ĝojo, ke ili venos por elpeli nin kaj ke fine eblos elverŝi mian tutan indignon kontraŭ ili. Sed, feliĉe, ili lasis nin en paco, kvankam estis malagrabla al mi.

La kantisto, kiu antaŭe rifuzis trinki vinon, nun haste finis la reston de la botelo por foriri de ĉi tie kiel eble plej baldaŭ. Tamen li sentis la bezonon, kiel ŝajnis al mi, danki min pro la regalo. Liaj plorantaj okuloj fariĝis eĉ pli malsekaj kaj brilaj, kaj li diris al mi ege strangan, konfuzan dankofrazon. Sed tamen, ĉi tiu frazo, en kiu li diris, ke se ĉiuj respektus la artistojn kiel mi, li fartus bone, kaj ke li deziras al mi ĉiun feliĉon, tre plaĉis al mi. Ni eliris en la koridoron. Tie staris la lakeoj kaj mia malamiko, la pordisto, kiu ŝajnis plendi ĉe ili pri mi. Ili ĉiuj ŝajnis rigardi min kvazaŭ mi estus freneza. Mi lasis preterpasi la vireton tre proksime de tiuj hotelgastoj kaj kun plej plena respekto, kiun mi povis esprimi, demetis mian ĉapelon kaj premis lian manon kun la sekiĝintaj ostecaj fingroj. La lakeoj faris kvazaŭ ili tute ne atentus min. Nur unu el ili ridis sardone.

Kiam la kantisto malaperis kun riverenco en la mallumo, mi supreniris al mia ĉambro, dezirante pridormi ĉiujn ĉi impresojn kaj la stultan infanecan koleron, kiu tiel neatendite trafis min. Sed, sentante min tro ekscitita por dormi, mi denove eliris sur la straton por promeni ĝis kiam mi trankviliĝos; krome, mi konfesas, ke mi havis la certan esperon, ke okazos kunpuŝiĝo kun la pordisto, la lakeo aŭ la anglo por pruvi al ili ties tutan kruelecon kaj, plej grave, maljustecon. Sed krom la pordisto, kiu, vidinte min, turnis sian dorson al mi, mi renkontis neniun kaj do sola komencis marŝi tien kaj reen sur la kajo.

\* \* \*

## Konkluda meditado

Jen ĝi, la stranga sorto de l’poezio – mi rezonis, iomete trankviliĝinte. – Ĉiuj amas, serĉas, deziras ĝin kaj strebas al ĝi en la vivo, kaj tamen neniun agnoskas ĝian potencon aŭ sufiĉe taksas ĉi tiun plej altan bonon de la mondo, kaj ankaŭ neniun estimas aŭ dankas tiujn, kiuj donas ĝin al la homoj. Demandu kiun ajn vi volas aŭ ĉiujn ĉi loĝantojn de la Ŝvejcero: kiu estas la plej alta bono en la mondo? Ĉiuj, aŭ naŭdek naŭ el cent, diros al vi kun sardona mieno, ke la plej alta bono de la mondo estas – la mono. „Eble vi ne ŝatas ĉi tiun penson kaj eble ĝi ne kongruas kun viaj altaj idealoj,“ oni diros, „sed kion vi povas fari, se la homa vivo estas tiel aranĝita, ke sole la mono faras la homon feliĉa? Oni ja ne povas malpermesi al sia menso vidi la mondon kia ĝi estas – oni aldonos, – tio estas vidi la veron.“ Kompatinda estas via menso kaj kompatinda estas la feliĉo, kiun vi deziras, kaj malfeliĉa estas la estaĵo, kiu ne scias, kion ĝi bezonas ... Kial vi ĉiuj forlasis vian patrujon, viajn parencojn, okupojn kaj monaferojn kaj amasiĝis en tiu malgranda svisa urbo Lucerno? Kial vi ĉiuj elkuris sur la

balkonojn hodiaŭ vespere kaj aŭskultis la kantadon de la malgranda almuzulo en respektema silento? Eĉ se li volintus kanti pli longe, vi daŭre estus silentintaj kaj aŭskultintaj. Diru, ĉu pro mono, eĉ por milionoj, oni estus povinta instigi vin forlasi vian patrujon por kolektiĝi en ĉi tiu malgranda urbeto Lucerno? Ĉu pro mono oni estus povinta logi vin sur la balkonojn, por ke vi staru tie silente kaj senmove dum duonhoro? Ne! La sola afero, kiu instigas agi vin kaj eterne movos vin pli forte ol ĉiuj aliaj motoroj de la vivo, estas la bezono je poezio, pri kiu vi ja ne konscias, sed kiun vi sentas kaj ankoraŭ longe sentos, ĝis kiam io homeca restos ĉe vi. La vorto 'poezio' estas ridinda por vi, vi uzas ĝin kiel primokindan riproĉon, vi agnoskas la amon al la poezia maksimume ĉe infanoj kaj naivaj fraŭlinoj kaj eĉ pri tiuj vi ridas. Kion vi bezonas estas io pozitiva. Jes, infanoj havas sanan rilaton al la vivo, ili aprezas kaj scias, kion la homo devas ami kaj kio donas feliĉon al li; sed vin la vivo tiel konfuzis kaj damaĝis, ke vi ridas pri tio, kion vi amas, kaj vi serĉas nur tion, kion vi malamas kaj kio faras vin malfeliĉa. Vi estas tiel konfuzitaj, ke vi ne konscias pri la devo, kiun vi havas rilate al la kompatinda tirolano, kiu havigis al vi puran plezuron. Samtempe vi konsideras vin devigita humiliĝi antaŭ iu lordo, vane, sen utilo kaj plezuro, kaj senkiale oferi al li vian pacon kaj komfortecon. Kia stultaĵo, kia neforigebla sensencaĵo! Sed ne tio ĉi plej forte okulfrapis min ĉi-vespere. La nescion pri tio, kio donas feliĉon, la senkonsciecon pri poeziaj plezuroj mi ankoraŭ povas preskaŭ kompreni aŭ alkutimiĝis al tio, ĉar mi ofte renkontis ĝin en la vivo; ankaŭ la kruda, senkonscia krueleco de la homamaso estis nenio nova por mi. Kion ajn diras la defendantoj de la racia penso de la popolo, la homamaso estas unuigo, en kiu ekzistas eble eĉ bonaj individuoj, sed kiu en sia tuteco tuŝas la malnoblajn flankojn, kompareblajn kun bestoj, kiu esprimas nur la malfortecon kaj kruelecon de la homa naturo. Sed kiel vi, infanoj de libera, humaneca popolo, vi kristanoj, vi, simple homoj, povis reagi kun malvarmo kaj moko al la pura plezuro, kiun la malfeliĉa petanta almuzulo donis al vi? Vi diros, ke en via lando ekzistas hejmoj por malriĉuloj kaj almuzuloj. Sed malriĉuloj kaj almuzuloj ne ekzistas, ĉar ili ne devas ekzisti, kaj ankaŭ ne devas ekzisti komparto, kiu baziĝas sur malriĉeco kaj almuzpetado. Sed li laboris, li feliĉigis vin kaj petegis, ke vi donu al li ion de tio, kion vi havas abunde, pro la laboro, kiun li faris je via favoro. Sed vi rigardis lin kiel raraĵon kun malvarma rideto el viaj altaj, brilaj ĉambroj, kaj el cent el vi feliĉuloj kaj riĉuloj estis neniuj, eĉ ne unu, kiu estus ĵetinta al li moneron! Hontigita li foriris de vi, kaj la stulta homamaso priridis, persekutis kaj insultis ne vin, sed lin, ĉar vi estas malvarmaj, kruelaj kaj senhonoraj, pro tio ke vi ŝtelis de li la plezuron, kiun li donis al vi, pro tio vi insultis *lin*.

*„La 7an de julio 1857, en Lucerno, antaŭ la hotelo Ŝvejcerhofo, kie loĝas la plej riĉaj homoj, vaganta almuzulo kantis kantojn kaj ludis gitaron dum duonhoro. Ĉirkaŭ cent homoj aŭskultis lin. La kantisto petis ĉiujn trifoje doni al li iom da mono. Eĉ ne unu homo donis al li monon, kaj multaj ridis pri li.“*

Ĉi tio ne estas elpenaĵo, sed nekontestebla fakto, kiun povas esplori tiuj, kiuj volas, ĉe la konstantaj loĝantoj de la Ŝvejcerhofo, aŭ konsultante la ĵurnalojn por konstati, kiuj estis la eksterlandanoj, kiuj restadis en la hotelo la 7an de julio.

Jen la okazaĵo, kiun la historiistoj de nia tempo devas registri per neforviŝeblaj flamaj leteroj. Ĉi tiu evento estas pli signifa, pli serioza kaj havas multe pli profundan sencon ol la faktoj, pri kiuj la ĵurnaloj kaj kronologioj raportas.

Ke la britoj mortigis mil pliajn ĉinojn pro tio, ke la ĉinoj aĉetis nenion per kontanta mono,<sup>33</sup> dum ilia tero glutas valorajn devizojn; ke la francoj mortigis mil pliajn kabilojn,<sup>34</sup> ĉar

<sup>33</sup> Temas pri politikaj eventoj de la jaroj 1856-57, kiuj estis vaste diskutataj en la eŭropa gazetaro. Fine de 1856, britaj ŝipoj pripafis kelkajn marbordajn urbojn en Ĉinujo sen deklari militon. La preteksto por tiu milita agado estis la arestado de opiaj komercistoj sur angla ŝipo fare de la ĉinaj aŭtoritatoj, kiun la britoj konsideris ofendo de la brita flago. La britojn subtenis francoj. Tiel komenciĝis la milito inter Anglujo kaj Francujo kun Ĉinujo, kiu finiĝis en 1860 per la okupado de Pekino.

<sup>34</sup> En 1857, dum la kolonia milito, la franca armeo finis la reziston de la kabiloj, anoj de indiĝenaj triboj loĝantaj en la montara nordokcidenta parto de Alĝerujo.

en Afriko la greno kreskas prospere kaj konstanta milito estas utila por la formado de armeoj; ke la turka sendito en Napolo ne rajtas esti judo<sup>35</sup> kaj ke imperiestro Napoleono promenas piede en Plombières<sup>36</sup> kaj tra la gazetaro certigas al la homoj, ke li regas nur laŭ la volo de la tuta popolo – ĉiuj tiuj vortoj nur kaŝas aŭ ilustras tion, kio delonge estas konata. Sed la evento okazinta en Lucerno la 7an de julio ŝajnas al mi tute nova kaj kurioza; ĝi ne apartenas al la eternaj malbonaj flankoj de la homa naturo, sed al certa etapo en la historio de la disvolviĝo de la socio. Ĉi tiu fakto ne estas parto de la historio de la homaj faroj, sed de la historio de la progreso kaj civilizo.

Kial ĉi tiu malhomeca fakto, kiu ne estus ebla en iu ajn vilaĝo germana, franca aŭ itala, eblas ĉi tie, kie la enkondukitaj civilizo, libereco kaj egaleco prosperas en la plej alta grado, kie vojaĝantoj kaj plej civilizitaj homoj de la plej civilizitaj nacioj renkontiĝas? Kial tiuj alt-evoluintaj, humanecaj homoj, kiuj ĝenerale kapablas al ĉiuspeca honesta, humana verko, ne havas homan korsenton por persona bona faro? Kial tiuj homoj en siaj parlamentoj, kunvenoj kaj societoj, fervore zorgantaj pri la situacio de needziĝintaj ĉinoj en Hindujo,<sup>37</sup> pri la disvastiĝo de la kristanismo kaj edukado en Afriko, pri la formado de la socioj por plibonigi la tutan homaron,<sup>38</sup> ne trovas en siaj animoj la plej simplan originan senton de homo al homo? Ĉu vere tiu sento ne ekzistas kaj ĝian lokon okupis vanteco, ambicio kaj egoismo, kiuj gvidas ĉi tiujn homojn en iliaj parlamentoj, kunvenoj kaj societoj? Ĉu la disvastiĝo de racia, egoisma homa unuiĝo, nomata civilizo, detruas kaj kontraŭdiras la bezonon de instinktiva kaj amople-na asociiĝo? Kaj ĉu vere temas pri tiu egaleco, pro kiu estis verŝita tiom da senkulpa sango kaj faritaj tiom multaj krimoj? Ĉu vere nacioj povas esti feliĉaj kiel infanoj, aŭdante nur la vorton „egaleco“?

Egaleco antaŭ la leĝo? Ĉu la tuta vivo de la homoj evoluas en la sfero de la leĝo? Nur unu milono de la vivo estas submetita al la leĝo, la resto ekzistas ekster ĝi, en la sfero de la moroj kaj sociaj vidpunktoj. Kaj en tiu socio la lakeo estas vestita pli bone ol la kantisto kaj rajtas ofendi lin senpune. Mi estas pli bone vestita ol la lakeo kaj do rajtas insulti lin senpune. La pordisto konsideras min pli altranga, kaj la kantisto sentas sin pli malaltrange. Kiam mi ligis min kun la kantisto, la pordisto konsideris sin egala al ni kaj fariĝis malĝentila. Mi fariĝis malafabla al la pordisto, kaj li agnoskis, ke li estas pli suba ol mi. La lakeo fariĝis malĝentila al la kantisto, kaj la kantisto akceptis tion, sentante sin pli sube ol li. Ĉu vere tio estas absolute libera ŝtato, kiel la homoj nomas ĝin, en kiu ekzistas unu civitano, kiun oni malliberigas pro tio, ke li, sen damaĝi aŭ ĝeni iun ajn, faras sian laboron, nome la solan, kiun li povas fari, por ne morti pro malsato?

Kia malfeliĉa, mizera estaĵo estas la homo, kiu estas ĵetita tien kaj reen kun sia bezono de pozitivaj decidoj en ĉi tiu ĉiam moviĝanta, senfina oceano de la bono kaj malbono, de la faktoj, konsideroj kaj kontraŭdiroj! Dum jarcentoj la homoj klopodas diferencigi la bonon unuflanke de la malbono aliflanke. La jarcentoj pasas, kaj kion ajn la senantaŭjuĝa menso metas sur la pesilojn de la bono kaj malbono, la pesiltasoj neniam ŝanceliĝas, kaj sur ĉiu flanko restas tiom da bono kiel malbono. Se la homo nur estus lerninta ne juĝi kaj pensi tiel sagate kaj definitive kaj ne ĉiam doni respondojn al demandoj, kiuj estas donitaj al li nur pro tio, ke por ĉiam ili restu demandoj! Se li nur komprenus, ke ĉiu penso estas kaj falsa kaj justa! Ĝi estas falsa, ĉar la homo estas unuflanka kaj ne kapablas percepti la tutan veron, kaj ĝi estas

<sup>35</sup> Temas pri tio, ke la registaro de Napolo rifuzis konfirmi la ambasadoron (aŭ senditon) de Turkujo pro tio, se li estas judo.

<sup>36</sup> Plombières-les-Bains estas kuracloko en la Vogezoj, Francio. Inter ĝiaj vizitantoj troviĝis famaj francoj de sia tempo kiel Michel de Montaigne, Voltaire, Napoléon Bonaparte, Joséphine de Beauharnais, Napoléon IIIa (pri kiu temas en la rakonto de Tolstoj), Hector Berlioz, Alphonse de Lamartine kaj Alfred de Musset.

<sup>37</sup> En julio 1857 la brita parlamento diskutis la demandon por allogi ĉinajn laboristojn al la britaj kolonioj. Sed la britoj maltrankviliĝis pro la fakto, ke la ĉinoj estis senditaj sen edzinoj, kio ne garantiis ilian daŭran loĝiĝon.

<sup>38</sup> Ŝajnas, ke ĉi tie temas pri la projekto de „Ĝenerala Eŭropa Unio de Nacioj“, pri kiu oni diskutis en anglaj kaj francaj ĵurnaloj en 1856-57.

justa, ĉar per ĝi ĉiam estas esprimita unu flanko de la homa strebado. Ili subdividis ĉi tiun eternan moviĝantan, senbordan kaj senfine miksitajn kaosojn de la bono kaj malbono, desegnis imagitajn liniojn kaj atendas, ke la maro dividiĝu laŭ ili. Certe ekzistas milionoj da aliaj dividoj el tute alia vidpunkto, sur alia ebena. Estas vere, ke tiuj novaj subdividoj elkristaliĝis dum jarcentoj, sed jam pasis milionoj da jarcentoj kaj denove pasos milionoj da jarcentoj. La civilizo estas beno, la barbareco estas malbeno; la libereco estas bona, la mallibereco estas malbona. Ĉi tiu imagita scio detruas la instinktivajn, benitajn prabezonojn de la bono en la homa naturo. Kaj kiu difinas al mi, kio estas libereco, kio estas despoteco, kio estas civilizo, kio estas barbareco? Kaj kie estas la limoj inter tiuj nocioj? Kiu havas en sia animo la neerareblan mezurilon por la bono kaj malbono, tiel ke li povus mezuri la efemerajn konfuzitajn faktojn per ĝi? Kiu havas tiel grandan menson por povi ampleksi kaj pesi ĉiujn faktojn de la senmova pasinteco? Kaj kiu vidis tian staton, en kiu la bono kaj malbono kune ne ekzistus? Kaj se mi vidas pli de la unua ol de la alia, de kie mi scias, ke mi konsideras la aferojn el ĝusta vidpunkto? Kiu kapablas mense komplete malligi sin de la vivo eĉ nur por eta momento por sendepende rigardi ĝin de supre? Ni havas nur unu solan neerareblan gvidanton: la Universalan Spiriton, kiu penetras nin ĉiujn kune kaj unuope kiel unuecon kaj donas al ĉiu la strebon al tio, kio estas necesa. Ĝi estas la sama spirito, kiu ordonas al la arbo kreski en la direkto de la suno, al la floro aŭtune disverŝi ĝiajn semojn kaj al ni simple kunpremiĝi.

Ĉi tiu sola senerara feliĉa voĉo supersonas la bruon rapidan disvolviĝon de la civilizo. Kiu estas pli homeca kaj kiu estas pli barbara: ĉu tiu lordo, kiu forkuris de la tablo kun malica sento, vidinte la ĉifonan vestaĵon de la kantisto, kaj donis al li por lia laboro eĉ ne milonon de sia riĉeco, kaj kiu nun, sata sidante en sia hela, komforta ĉambro, trankvile komentas la okazaĵojn en Ĉinujo, trovante la murdojn faritajn tie en ordo, – aŭ la malgranda kantisto, kiu konstante timas esti sendita en la malliberejon kaj kun unu sola franko en la poŝo jam dum dudek jaroj vagadas tra la montoj kaj valoj sen fari malbonon al iu ajn, ĝojigante la homojn per sia kantado, kvankam oni insultis kaj preskaŭ forpelis lin hodiaŭ, kaj kiu laca, malsata kaj kun honto iris dormi ie sur putranta pajlo?

En ĉi tiu momento mi subite aŭdis flanke de la urbo en la morta nokta silento de malproksime la gitaron de la vireto kaj lian voĉon.

Ne – diriĝis al mi vole nevole, – vi ne rajtas bedaŭri lin kaj senti koleron kontraŭ la bonstato de la lordo. Kiu pesis la internan feliĉon, kiu kuŝas en la animo de ĉiuj tiuj homoj? La kantisto nun verŝajne sidas ie sur malpura sojlo, rigardas la brilan lunluman ĉielon kaj ĝoje kantas meze de la kvietaj, bonodora nokto, dum en lia animo estas neniu riproĉo, neniu kolero kaj neniu pentado. Kaj kiu scias, kio okazas nun en la animoj de ĉiuj ĉi homoj malantaŭ ĉi tiuj riĉaj altaj muroj? Kiu scias, ĉu en ili ĉiuj ekzistas tiom senzorga, milda vivĝojo kaj harmonio kun la mondo kiel ĝi vivas en la animo de tiu vireto? Senfinaj estas la boneco kaj saĝeco de tiu, kiu permesis kaj ordonis ĉiujn tiujn kontraŭdirojn. Nur vi, sensignifa vermo, kiu aŭdacas peni kontraŭleĝe penetri liajn principojn kaj intencojn, nur vi ŝajnas vidi kontraŭdirojn. Li kviete rigardas de sia hela nemezurebla alteco kaj ĝojas pri la senfina harmonio, en kiu vi ĉiuj senfine moviĝas en kontraŭdiroj. Pro via orgojlo vi kredis, ke vi povas liberiĝi de la ĝeneralaj leĝoj. Ne, ankaŭ vi kun via eta ridinda indigno kontraŭ la lakeoj Ne, ankaŭ vi kun via eta vulgara indigno kontraŭ la lakeoj agis laŭ la harmonia bezono de la eterna kaj senfina ...

La 8an de julio 1857

El la rusa kaj germana lingvoj al Esperanto tradukis Andreas Künzli, Svislando, vintro 2021.

Ĉi tiu nova Esperanto-traduko de 2021 plene anstataŭas la unuan version publikigitan en *Literatura Foiro* n-roj 129 kaj 130 de 1991.

Ruslingva teksto:

[https://rvb.ru/tolstoy/01text/vol\\_3/01text/0019.htm](https://rvb.ru/tolstoy/01text/vol_3/01text/0019.htm)

Germanlingva traduko:

[http://www.evgeniya.ch/dok\\_publ/TolstojInLuzern1857.pdf](http://www.evgeniya.ch/dok_publ/TolstojInLuzern1857.pdf)

<https://www.projekt-gutenberg.org/tolstoi/luzern/chap001.html>

Anglalingva traduko:

<https://en.wikisource.org/wiki/Lucerne>